

Simon Dach,

Anjo de Tharaŭ

tradukita de N. N. 93

Anjo de Tharaŭ plej plaĉas al mi;
pli ol trezoro valoras ja ŝi.
Ankaŭ la koron en amsimpatia'
Anjo de Tharaŭ donacis al mi.
Anjo de Tharaŭ pli kara ol or',
vi, mia vivo kaj sango kaj kor'!

Eĉ se malsano renkontas nin du
kaj militiro, disigo, malĝu',
tamen pli forte kunligus destin'
ĝis lasta spiro de l'viv' ambaŭ nin!
Anjo de Tharaŭ pli kara ol or',
vi, mia vivo kaj sango kaj kor'!

Kiel palmarbo post pluva veter'
multe ple rekte ekstaras el ter',
tiel la am' pligrandiĝos en kor'
post la mizero kaj brula dolor'.
Anjo de Tharaŭ pli kara ol or',
vi, mia vivo kaj sango kaj kor'!

Kaj se forprenos vin iam la sort'
kaj al senluma kondukus vin bord',
tiam mi sekvus tra fajro kaj mar',
tra malamika eĉ militistar'.
Anjo de Tharaŭ pli kara ol or',
vi, mia vivo kaj sango kaj kor'!

...

Simon Dach,

Ännchen von Tharau

Ännchen von Tharau ist's, die mir gefällt,
Sie ist mein Leben, mein Gut und mein Geld.
Ännchen von Tharau hat wieder ihr Herz
Auf mich gerichtet in Lieb' und in Schmerz.
Ännchen von Tharau, mein Reichthum, mein Gut,
Du meine Seele, mein Fleisch und mein Blut!

Käm alles Wetter gleich auf uns zu schlahn,
Wir sind gesinnt, beieinander zu stahn.
Krankheit, Verfolgung, Betrübnis und Pein
Soll unsrer Liebe Verknötigung sein.
Ännchen von Tharau, mein Reichthum, mein Gut,
Du meine Seele, mein Fleisch und mein Blut!

Recht als ein Palmenbaum über sich steigt,
hat ihn erst Regen und Sturmwind gebeugt,
So wird die Lieb' in uns mächtig und groß
Durch Kreuz, durch Leiden und traurigem Los.
Ännchen von Tharau, mein Reichthum, mein Gut,
Du meine Seele, mein Fleisch und mein Blut!

Würdest du gleich einmal von mir getrennt,
Lebtest da, wo man die Sonne kaum kennt;
Ich will dir folgen durch Wälder und Meer,
Eisen und Kerker und feindliches Heer.
Ännchen von Tharau, mein Reichthum, mein Gut,
Du meine Seele, mein Fleisch und mein Blut!

...

Simon Dach,

Anjo de Tharaŭ

tradukita de Ludwig Emil Meier

Anjo de Tharaŭ plaĉegas al mi,
Monon kaj vivon mi donus por ŝi;
Anjo de Tharaŭ en ĝoj' kaj dolor',
Min rekompencas per propra la kor',
Anjo de Tharaŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Eĉ se minacus la mondo-ruin',
Tamen neniel forlasus ni nin:
Ĉar en danĝero, turmento, ĉagren'
Amon firmigas ĉiela la ben'.
Anjo de Tharaŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Kiel altiĝas palm-arba tegment'
Post batala do je pluvo kaj vent',
Tiel kreskadas de l'amo la fort'
Per suferado kaj moko de l'sort'.
Anjo de Tharaŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Se vi disiĝus nevole de mi,
Kien ne vagas eĉ sunoradi',
Mi vin sekvadus trans montoj kaj mar',
Spite mizero kaj malamikar'.
Anjo de Tharaŭ, vi rava sunbril',
Paco de l'vivo, de l'koro azil'!

...

.....	Ännchen von Tharau, mein Licht, meine Sonn,
.....	Mein Leben schließ' ich um deines herum.
.....	Ännchen von Tharau, mein Reichthum, mein Gut,
.....	Du meine Seele, mein Fleisch und mein Blut!
.....	Was ich gebiete, wird von dir getan,
.....	Was ich verbiete, das lässt du mir stahn.
.....	Was hat die Liebe doch für ein Bestand,
.....	Wo nicht ein Herz ist, ein Mund, eine Hand?
.....	Wo man sich peiniget, zanket und schlägt,
.....	Und gleich den Hunden und Katzen begeht.
.....	Ännchen von Tharau, mein Reichthum, mein Gut,
.....	Du meine Seele, mein Fleisch und mein Blut!
.....	Ännchen von Tharau, das wolln wir nicht tun;
.....	Du bist mein Täubchen, mein Schäfchen, mein Huhn.
.....	Was ich begehre, begehrest du auch,
.....	Ich lass den Rock dir, du lässt mir den Brauch.
.....	Ännchen von Tharau, mein Reichthum, mein Gut,
.....	Du meine Seele, mein Fleisch und mein Blut!
.....	Dies ist dem Ännchen die süßeste Ruh',
.....	Ein Leib und Seele wird aus Ich und Du.
.....	Dies macht das Leben zum himmlischen Reich,
.....	Durch Zanken wird es der Hölle gleich.
.....	Ännchen von Tharau, mein Reichthum, mein Gut,
.....	Du meine Seele, mein Fleisch und mein Blut!
...

Traduko de la Germana poemo “Ännchen von Tharau” de Simon Dach en Esperanton de N. N. 93.

Arg-1034-2099 (2014-05-31 12:53:15)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro “Internacia Kantaro”, eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Benemann.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Simon Dach.

Arg-1034-2097 (2014-05-31 12:23:02)

Pri la kanto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Ännchen_von_Tharau. Vidu ankaŭ: <http://www.volksliederarchiv.de/text684.html>.

*Traduko de la Germana poemo “Ännchen von Tharau” de Simon Dach en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919).*

Arg-1034-2098 (2014-05-31 12:29:43)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en http://kantaro.ikso.net/anjo_de_tarau.